## Babilada rondo

... okazas je la 19-a.
Aliĝu rekte ĉe la
gastiganto mem.



**Vendrede, la 13-an de januaro 2012**
**... ĉe Knud k.M-A Sunier**
**Alpes 150 * Montreux**
**021 961 38 56**

* * * * *

Aliĝu al «Doodle» por la venontaj babiladaj rondoj :
**www.doodle.com/iffkkw7undkzfz8p**







## AGENDU

28-an de aprilo 2012
Ĝenerala Kunveno
de SES en Vevey


**Laŭzana Esperanto - Societo**
Poŝtfako – Case postale 246 * CH – 1000 LAUSANNE 22
+41 (0)76 411 14 55 * +41 (0)21 647 29 28
esperanto@citycable.ch * www.esperanto.ch/Lausanne
Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8

Prez.: David Bühlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: Francisko Randin * 076 411 14 55 - Kasisto.: Sonia Daubercies * 077 494 99 39


# Laŭzana Esperanto-Societo

# Informilo

Januaro 2012 – n° 01

**Lunde la 9-an de januaro 2012,**
**je la 20-a**
ĉe la unua etaĝo de la stacidoma bufedo
***Venu kun viaj demandoj,***
***lingvaj problemoj***
***Venu kun viaj malkovraĵoj***

**Lunde la 6-an de februaro**
*Ĝenerala Asembleo*

**Lunde la 5-an de marto**
*Decidota*

**Lunde la 2-an de aprilo**
*Preparado pri la ekspozicio en Vevey (Magasin du Monde) sub la respondeco de Karlota*

**Lunde la 7-an de majo**
*Decidota*

**Sabate la 16-an de junio**
*Ekskurso*

# La novaj vestoj de la imperiestro

(Marjorie Boulton laŭ Anderson)

"Via Reĝa Moŝto nun volu plej afable demeti viajn plej altajn vestojn, diris la trompantoj, kaj ni al Via Rega Moŝto tie ĉi antaŭ la spegulo vestos la novajn."

La reĝo demetis siajn vestojn, kaj la trompantoj faris, kvazaŭ ili vestas al li ĉiun pecon de la novaj vestoj, kiuj kvazaŭ estis pretigitaj; kaj ili prenis lin per la kokso kaj faris kvazaŭ ili ion alligas - tio ĉi devis esti la trenaĵo de la vesto - kaj la reĝo sin turnadis kaj returnadis antaŭ la spegulo.

"Kiel belege ili elrigardas, kiel bonege ili sidas!" ĉiuj kriis, "Kia desegno, kiaj koloroj! ĝi estas vesto de granda indo!"

"Sur la strato oni staras kun la baldakeno, kiun oni portos super Via Reĝa Moŝto en la parada irado!" raportis la ĉefa ceremoniestro.

"Nu, mi estas en ordo!" diris la reĝo. "Ĉu ĝi ne bone sidas?" Kaj ankoraŭ unu fojon li turnis sin antaŭ la spegulo, ĉar li volis montri, ke li kvazaŭ bone observas sian ornamon.

La ĉambelanoj, kiuj devis porti la trenaĵon de la vesto, eltiris siajn manojn al la planko, kvazaŭ ili levas la trenaĵon. Ili iris kaj tenis la manojn eltirite en la aero; ili ne devis lasi rimarki, ke ili nenion vidas. Tiel la reĝo iris en parada marŝo sub la belega baldakeno, kaj ĉiuj homoj sur la stratoj kaj en la fenestroj kriis: "Ho, ĉielo, kiel senkomparaj estas la novaj vestoj de la reĝo! Kian belegan trenaĵon li havas al la surtuto! kiel bonege ĉio sidas!" Neniu volis lasi rimarki, ke li nenion vidas, ĉar alie li ja ne taŭgus por sia ofico aŭ estus terure malsaĝa. Nenia el la vestoj de la reĝo ĝis nun havis tian sukceson.

"Sed li ja estas tute ne vestita!" subite ekkriis unu malgranda infano. "Ho ĉielo, aŭdu la voĉon de la senkulpeco!" diris la patro; kaj unu al la alia murmuretis, kion la infano diris.

"Li estas tute ne vestita; tie staras malgranda infano, kiu diras, ke li tute ne estas vestita! Li ja tute ne estas vestita!" kriis fine la tuta popolo. Tio ĉi pikis la reĝon, ĉar al li jam mem ŝajnis, ke la popolo estas prava; sed li pensis: "Nun nenio helpos, oni devas nur kuraĝe resti ĉe sia opinio!" Li prenis teniĝon ankoraŭ pli fieran, kaj la ĉambelanoj iris kaj portis la trenaĵon, kiu tute ne ekzistis.